Informilo de Marto 2017

Numero 27, marto 2017

Lingvoj kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo: Simpozio emfazos vundeblajn homgrupojn

1 marto 2017. Christine Hélot kaj François Grin estos ĉefparolantoj en la ĉi-jara simpozio pri lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj organizita de la Studgrupo pri Lingvo kaj UN kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. Christine Hélot estas profesoro pri la angla lingvo en la eduka fako de la Universitato de Strasburgo, Francio. Ŝi aparte interesiĝas pri lingva justeco kaj la edukado de migraj infanoj. François Grin estas profesoro pri ekonomiko en la traduka fakultato de la Universitato de Ĝenevo, Svislando. Li estas larĝe rigardata kiel gvida figuro en la kampo lingvo kaj ekonomiko kaj multe verkis pri tiu temo.

La dutaga simpozio okazos ĵaŭdon kaj vendredon la 11-an kaj 12-an de majo en UN Church Center, 777 United Nations Plaza, New York. Ĝi pritraktos la temon “Lingvo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj Vundeblaj Homgrupoj.” Pledantoj por la Celoj pri Daŭripova Evoluigo, la ĉefa elemento en la tagordo de UN pri evoluigo en la periodo 2015-2030, emfazas la neceson atingi la plej vundeblajn homgrupojn unue – sed tiuj homgrupoj estas ofte izolitaj pro lingvaj bariloj kaj pro nerekono de la bezono de dudirekta komunikado. La problemon pliakrigas la fakto ke tiuj vundeblaj homgrupoj daŭre pligrandiĝas pro la ĉiam kreskanta nombro de homoj dislokitaj el siaj hejmoj pro militagado.

La simpozio, kiu estas malferma al UN-personaro, neregistaraj organizaĵoj, esplorantoj kaj aliaj interesatoj, celas konsciigi personojn laborantajn sur la tereno de evoluigo pri la neceso kompreni kaj aŭskulti la voĉojn de tiuj kiuj ofte restas neaŭskultataj, kaj antaŭenigi esplorojn pri tiuj problemoj. Detaloj pri la simpozio troviĝas ĉe www.languageandtheun.org.

Mesaĝo de UEA okaze de Internacia Virina Tago

8 marto 2017. Hodiaŭ Universala Esperanto-Asocio faris la jenan deklaron okaze de Internacia Virina Tago.

Internacia Virina Tago estas okazo por pripensi la progreson faritan survoje al forigo de diskriminacio kontraŭ virinoj kaj insistado pri iliaj egalaj rajtoj, kaj ankaŭ por konsideri la longan vojaĝon al egaleco kiu ankoraŭ irendas.

Universala Esperanto-Asocio aparte zorgas pri la efikoj de edukaj kaj sociaj malegalecoj sur la vivoj de knabinoj kaj virinoj. Al grandaj nombroj tra la mondo oni baras aliron al edukado samnivela kiel tiu de iliaj fratoj, kaj la proporcio de analfabetaj virinoj estas pli alta ol tiu de viroj. Tiuj kondiĉoj estas proksime ligitaj al pli limigita aliro al la lingvoj de pli vasta komunikado kaj politika partopreno, kaj tial al malpli da influo en la familia kaj socia decidfarado.

Kaj la progreso ne estas egala: en iuj mondopartoj, la kondiĉo de virinoj eĉ plimalboniĝas.

Samtempe, UEA agnoskas kaj estimas la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revigligo, kaj por la protektado de “la doma vivo de la popoloj” kontraŭ diversaj formoj de subpremo kaj diskriminacio. Tiaj klopodoj estas esenca parto de la strebado por konstrui mondon en kiu multaj lingvoj kaj kulturoj povas kunekzisti harmonie. La protektado kaj antaŭenigo de la rajtoj de virinoj estas nemalhavebla dimensio de ĉi tiu strebado.

En ĉi tiu Internacia Virina Tago, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kaj por konstrui daŭripovan estontecon en kiu ĉiuj homoj estas traktataj kun egalaj zorgo kaj respekto, senkonsidere pri lingvo, kulturo, genro, kaj aliaj formoj de diverseco.

Preparoj antaŭeniras por Seula renkontiĝo

28 februaro 2017. Planoj por la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Seulo, Korea Respubliko, de 22 al 29 julio, jam bone progresas. “Turismo kaj Evoluigo: Vojoj al Daŭripovo” estos la temo de la kongreso. La elekton emfazi daŭripovan turismon inspiris la decido de la Ĝenerala Asembleo de UN nomi la jaron 2017 Internacia Jaro por Daŭripova Turismo.

La kongreso, ĉe la Universitato Hankuk por Eksterlandaj Studoj, atendeble renkontigos pli ol mil partoprenantojn, speciale el la landaj Esperanto-asocioj en Ĉinio, Japanio, Vjetnamio, Mongolio, Indonezio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando, plus kompreneble la Korea Esperanto-Asocio. La ĉiujara kongreso estas okazo por kunvenoj de Universala Esperanto-Asocio, teatraj kaj muzikaj prezentoj, fakulaj kunsidoj, literaturaj konkursoj, kaj abundaj aliaj aranĝoj.

Esperanto en Sovetunio estos la temo de estontaj aranĝoj en Novjorkurbo

11 marto 2017. La jaro 2017 markas la centan datrevenon de la Oktobra Revolucio, kaj du prelegoj en la Prelegserio Tivadar Soros memorigos pri tiu okazintaĵo. Vendredon la 10-an de marto, profesoro Brigid O’Keeffe (Brooklyn College, City University of New York) parolis pri fruaj esperantistaj delegacioj al Sovetunio. En la jaroj tuj post la Revolucio, multaj laboristaj esperantistoj vizitis siajn rusajn kamaradojn por mem vidi la atingojn de la nova Rusio. La rezultoj estis miksitaj: iuj esperantistoj rehejmeniĝis entuziasmaj, dum aliaj estis seniluziigitaj pro tio kion ili vidis.

Frua soveta entuziasmo por Esperanto estingiĝis pro la pendolado al naciismo sub Jozef Stalin. La Esperanto-movado estis sovaĝe subpremata kaj ĝiaj gvidantoj estis ekzekutitaj aŭ ekzilitaj. Tiun evoluon priskribos, en la posta Prelego Tivadar Soros la 12-an de majo, la germana historiisto Ulrich Lins. Liaj du libroj Dangerous Language: Esperanto under Hitler and Stalin kaj Dangerous Language: Esperanto and the Decline of Stalinism ĵus (2017) aperis ĉe Palgrave Macmillan, en traduko el Esperanto de Humphrey Tonkin.

La prelego de Brigid O’Keeffe okazis ĉe CUNY Graduate Center, Fifth Avenue ĉe 34th Street. Tiu de Ulrich Lins okazos ĉe UN Church Center, 777 United Nations Plaza (First Avenue ĉe 44th Street) je la 4-a ptm.
Vidu www.soroslectures.org.

La du libroj de Lins ne estas la solaj lastatempaj libroj pri Esperanto. La libro de Esther Schor, Bridge of Words: Esperanto an the Dream

of a Universal Language (Metropolitan Books, 2016), daŭre ricevadas pozitivajn recenzojn. Prof. Schor kaj filmisto Sam Green prezentos prelegon/filmprezenton pri Esperanto ĉe Mid-Manhattan Library, 455 Fifth Avenue, tuj trans la strato de la Novjorka Publika Biblioteko merkredon la 15-an de marto je 6:30 ptm. Vidu
https://www.nypl.org/events/programs/2016/02/22/bridge-words-esperanto-and-dream-universal-language-esther-schor-poet

Ĉiuj tiuj aranĝoj estas senpagaj kaj malfermaj al la publiko.

TEJO ĉe Ekosok: Rekoni la valoron de la junularo

1 marto 2017. Francesco Maurelli, Sara Spanò (estrarano de UEA) kaj Raúl J García (vicprezidanto de la Novjorka Esperanto-Societo) lastatempe reprezentis la junularan Esperanto-organizaĵon TEJO en la Junulara Forumo de EKOSOK (la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN) ĉe la domo de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko. Francesco Maurelli parolis pri financado por junularaj organizaĵoj: “Mi klarigis ke la unua granda defio estas rekono de la valoro de junularo kaj de junulara laboro. Mi citis studon kiu montris ke por ĉiu unuopa dolaro investita en junularo, la socio rehavas inter 8 kaj 24. Se la valoro estas rekonata, tiam indas kaj endas investi pli en junularo kaj ne lasi nur la restaĵojn. Fine, ne sufiĉas nur disponigi monon, sed gravas ankaŭ alirigi tiun monon al tiuj kiuj bezonas ĝin. Mi citis interalie ankaŭ lingvajn barojn kaj rajtojn de minoritatoj. Sekve mi prezentis ekzemplojn el mia laboro en TEJO, kaj finis per prezento de la kapablokonstrua projekto inter Europo kaj Afriko.”

“Unu el miaj profesioj estas ĝuste certigi daŭripovan financadon de agadoj por junularaj organizoj (pere de la firmao Kosmo), do mi havas multe da sperto pri la temo kaj la defioj. Mi feliĉas ĉar mi sukcesis enmeti ĉiujn gravajn erojn en malmulte da tempo: la bezono je pli da rekono, pli da mono kaj je pli da alirebleco. Mi menciis ICMYO, mi menciis TEJO, mi parolis pri lingvaj temoj, kaj prezentis la afrikan projekton de TEJO. Mi pensas ke mi tuŝis gravajn temojn por la junularo. Multaj homoj gratulis min poste kaj diris ke mia prelego estis grava, interesa kaj vigla.”

http://tejo.org/tejo-partoprenas-en-ecosoc-junulara-forumo-2017-ce-la-unuigintaj-nacioj

Esperantistoj funebras la morton de la evoluiginto de Pinjina skribsistemo

1 februaro 2017. Zhou Youguang, kies lastatempa morto je la aĝo 111 estis larĝe anoncita en la gazetaro, estis plej bone konata kiel la evoluiginto de Pinjino, la latinigita skribsistemo por la ĉina lingvo uzata por transskribi la ĉinan en latinajn literojn. Pere de pinjino, sennombraj ĉinaj infanoj, kune kun alilandanoj el ĉiuj mondopartoj, ricevis helpon en lernado de la ĉina lingvo; Pinjino faciligis utiligon de normaj klavaroj por entajpi ĉinajn ideogramojn, kaj ĝi efikis kiel ilo por normigi geografiajn nomojn kaj aliajn terminojn.

Malpli konata estas tio, ke la internacia lingvo Esperanto rolis kiel forta inspiro al Zhou Youguang, kiel ĝi jam faris por pli fruaj pioniroj de ĉina latinigo: esperantistoj el Ŝanhajo (kie Zhou Yougang studis en la 1920-aj jaroj) estis inter tiuj, kiuj pioniris evoluigon de latinaj sistemoj por skribi la ĉinan en la 1920aj kaj 1930aj jaroj. La granda ĉina verkisto Lu Xun (Lusin), mem esperantisto, estis inter tiuj kiuj favoris latinigon.

En Tanzanio okazis la Sesa Afrika Kongreso de Esperanto

1 februaro 2017. Esperantistoj el ok afrikaj landoj kolektiĝis en Bunda, Tanzanio, por la Sesa Afrika Kongreso de Esperanto de 24 ĝis 31 decembro. Partoprenantoj vokis al Universala Esperanto-Asocio, ke ĝi foje okazigu sian ĉiujaran kongreson en afrika lando (la kongreso okazis almenaŭ unu fojon en ĉiuj aliaj kontinentoj), kaj helpu en trejnado de gvidantoj kaj organizantoj de la Esperanto-movado tra Afriko. La kongresa rezolucio ankaŭ alvokis afrikajn esperantistojn, ke ili plibonigu sian kapablon paroli kaj skribi Esperanton kaj uzi la lingvon “por konservi, savi, disvolvi” afrikan kulturon, tradukante afrikajn verkojn en Esperanton kaj mem verkante kaj eldonante en la lingvo.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041